

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Hama-Ronda Tago, 29a de marto


En Esperanto-Muzeo Jokohama, de 15:35 ĝis 16:50 de la 29a de marto, ni okazigis Hama-Rondan Tagon kun jena enhavo, kun 10 vizitantoj kaj 1 reta preleganto. Poste 8 personoj libervole aliĝis al prezado de sakuroj (vidu sube).

(1) Pri ĉi-jara UK en Aŭstrio : reta prelego de Namba Fumiharu. Li planas viziti multajn landojn antaŭ kaj post la UK, inkluzive de Hispanio por spekti sun-eklipson.

(2) «Kanto de Hama-Rondo», laŭ uklela akompano : ludo kaj kantigo de Miyazaki Hideko.

La kanto estis por la 25-jariĝo de Jokohama Esperanto-Rondo, la antaŭa nomo de nia NPO Esperanto Jokohama. Miyazaki revivigis la kanton el la forgeso, mem kantis kaj ekzercis nin en la kantado.

(3) Redakto de «Fantomrakontoj» de Lafcadio Hearn, de Sibayama Zyun'iti. Kiel raportite en la marta n-ro, tiu libro aperis, laŭ redakto kaj tradukado de la rakontoj fare de la preleginto. (supra foto)



Sakuraj floroj prezentitaj kun pendlanteroj

Borde de la Rivero Oooka, ankaŭ ĉi-jare estis prezado de sakuraj floroj, kun pendlanteroj lumigataj vespere : de la 21a de marto ĝis la 5a de aprilo. Nia rondo ofertis 6 lanternojn kun nia nomo aŭ slogano.

Sur la pendlanteroj, oni legas vortojn kiel: PLEZURAN!, BELAN! ktp.

La 138-a Legokunsido

En la 6a de marto okazis la 138-a Legokunsido por "Fabeloj kaj Eseoj de SUMII Sue" verkita de SUMII Sue, tradukita kaj kompilita de HUZIMAKI Ken'iti. Partoprenis 5 personoj.

Interesaj kaj leciondonaj "Fabeloj kaj Eseoj de Sumii Sue"

Mizro Iwaya

Mi ne sciis ĝis nun ke la fama verkisto Sumii Sue verkis ankaŭ fabelojn. Ĉi-foje mi legis ilin en lerta traduko de Huzimaki Ken'iti, kaj trovis ke ili estas ne nur interesaj sed ankaŭ leciondonaj. La tradukinto diris ke infanoj estas sufiĉe saĝaj. Kiam ili legas fabelojn, ili certe sentas ion kaj pensas ion. Tial "saĝaj fabeloj" taŭgas por ili. Jes, mi rememoras faman verkon "La eta princo" de Saint-Exupéry. Infanoj legas ĝin kun intereso, sed ankaŭ plenaĝuloj legas ĝin kun eĉ pli da intereso. Ili legas ĝin kun sia gusto kaj sentas ion laŭ la aĝoj. Ĉiu legas libron kaj gustumas ĝin laŭ sia maniero. Tia estas bona libro.

Tiaj estas verkoj de Sumii Sue. Ŝi certe havis sian firman guston kaj verkis fabelojn laŭ sia gusto. Tial ŝiaj verkoj brilas pli. En tiu libro troviĝas sume kvin fabeloj. Ĉiuj estas interesaj, sed nun mi prenas unu el ili titolitan "La spegulo, kiu fariĝis ĉielo." Tiu verko montras grandan amplekson da homa historio. Granda sfinkso Arurun komencis rakonti okazaĵon, kiun ĝi vidis, eble antaŭ kvar mil jaroj. Ĝi menciis malsaĝan batalon inter reĝidoj kun elreviga rezulto. Ĝia sinteno estis modera kaj neŭtrala.

Post la rakontado ĝi komencis dormi kaj revekiĝos eble post milionoj da jaroj. La aŭtoro sukcesis montri homan historion en grandega perspektivo de tempopaso. Tia grandskala historio plaĉas al mi.

Samtempe mi devas mencii ke la aŭtoro verkis eseojn kun sama

inteligenteco. Ŝia sinteno povas esti esprimata kiel sendependa pensulo. Sendependa el la socio, sendependa el la politiko, k.t.p. Plejparto el la eseoj temas pri okazaĵoj antaŭ la Pacifika Milito. Ni scias ke la socia tendenco en tiu tempo estis tre naciisma, eĉ ŝovinisma en Japanio. Ekzemple oni ofte hisis nacian flagon antaŭ sia domo. Kiam ŝi estis en lernejo, ŝi eksciis ke nur ŝia familio kaj unu alia malriĉa familio ne posedis nacian flagon. La unua havis nenian intereson en ŝtata afero, kaj la lasta ne povis aĉeti ĝin pro malriĉeco. Tia estis la cirkonstanco ĉirkaŭ ŝi. Nuntempe ŝia konduto ne estas speciala nek unika, sed se ni komparas ĝin en la socio antaŭ la milito, ni povas trovi ŝian unikecon.

La tradukinto samtempe kompilis la libron. Tie ni povas scii lian guston. Certe ankaŭ li estas sendependa kaj pensema. La rezultinta libro estas sufiĉe interesa kaj rekomendinda.

Leginte la ĉarman libron "Fabeloj kaj Eseoj de SUMII Sue"

SIBAYAMA Noriko

Tiu ĉi libro konsistas el du partoj: la unua el kvin fabeloj kaj la dua el eseoj.

Kiam mi vidis la libron, la ilustraĵoj logis min. La humuraj bildoj kvazaŭ karikaturaĵoj firme kaptis mian koron. La fabeloj estas interesaj ankaŭ al plenaĝuloj, ne nur al infanoj, kaj ĉiu rakonto okazas en fantazia lando. Desegni sennacian ilustraĵon ŝajnas esti malfacile. Mi opinias, ke la ilustraĵoj aldonas valoron de la libro.

Inter la kvin fabeloj 'la Kalsono de Kapao' plej plaĉas al mi, ĉar ĝi estas plej humura kaj amuza. Kial nek krono nek ĉapo, sed kalsono estas la simbolo de reĝo? Por skribi impreson de la libro mi nete relegis la rakonton, do ĝi denove ridigis min.

En la esea parto ŝi verkis pri du familioj kiuj ne havas japanan flagon. Unu estis la familio de SUMII Sue kiu ne volis aĉeti la flagon kontraŭante naciismon, kaj la alia estas tro

Fabeloj kaj Eseoj de SUMII Sue



Japano Esperanta Librokooperativo

malriĉa familio por aĉeti ĝin. Mi memoris, ke ankaŭ en mia hejmo miaj gepatroj aĉetis japanan flagon laŭ sugesto de lernejo kiam mi estis bazlerneano. Miaj gepatroj aĉetis la flagon kaj montris ĝin antaŭ la domo en festotago. Mi mem nenion suspektis ke ĝi celas naciismon. Kaj feliĉe neaĉetintoj de flago ne estis riproĉitaj de aĉetintoj (malsame de tiu ĉi libro).

La aŭtorino diras, ke ankaŭ imperiestro ne havas liberan rajton elekti profesion. Mi samopinas kun ŝi. Ĉu imperiestro laciĝis de kuirita kukumo kaj sopiras krudan kukumon same kiel la Reĝo de Kapao? Por ke imperiestro povu manĝi krudan kukumon, li devas ekŝiĝi de sia posteno. Tamen tio ne eblas, ĉu?

Tiu ĉi libro kostas 1000 enojn: ege malmultekosta, ĉar la tradukinto, s-ro Huzimaki Ken'iti, mem tajpis, enpaĝigis kaj kompilis. Plie desegnis la bildojn lia filino Lumo. Ĝi estas tre bone farita bela libro, tamen troviĝas multaj malgrandaj eraroj (plejparte literumado de vortoj). Eble li ŝparis pagi por provlegado?

Kiam mi estis supermezlerneano, mia lernejo decidis spekti filmon "La Rivero sen Ponto" kiel lernejan eventon. Tiam mi unuafoje renkontis la nomon SUMII Sue, kiu verkis romanon "La Rivero sen Ponto", kiu traktis la temon de diskriminacio de speciala kvartalo nomata "*buraku*". Unu el niaj instruistoj arde rekomendis al ni legi la libron, pro tio mi tiam legis komencajn tri volumojn. Tiam mi pensis, ke SUMII Sue estas verkistino kontraŭ kvartala diskriminacio. Sed nun mi komprenas, ke ŝi kontraŭis diversajn diskriminaciojn, kaj en la bazo estas tia ideo: ĉiuj nacioj, ĉiuj homoj estas egalaj. Ŝi firme kaptis la ideon kiam ŝi estis 6-jara, eksciinte, ke ankaŭ imperiestro fekas.

"Fabeloj kaj Eseoj" de Sumii Sue Sibayama Zyun'iti

Sumii Sue estas japana verkistino travivinta la 20-ajarcentan Japanion (1902-1997), kaj la duono de tiu ĉi libro estas ŝiaj "fabeloj", dum la alia duono estas ŝiaj "eseoj", kun komentario de Huzimaki Ken'iti — li estis ne nur tradukinto, sed kompilinto, ĉar la elekto, kiujn fabelojn kaj kiujn eseojn enigi en ĉi tiu 100-paĝa libro estis laŭ li.

FABELOJ

Enestas 5 fabeloj, kiuj antaŭe aperis kiel bildolibroj por etuloj. Ili estis kompilitaj en ĉi tiu libro, kun humuraj desegnaĵoj de Lumo, la filino de la tradukinto. La desegnaĵoj estas el plumo, nur nigra, eĉ en la kovrila paĝo: mi ŝatus vidi ilin en multekoloraj desegnaĵoj.

El la 5 "fabeloj", 4 estas, laŭ mi "fabloj": rakontoj en malrealisma situacio, kiu sentigas absurdon en la reala mondo; temas ĉefe pri tio, kiel estroj (reĝoj ktp) estas nur surface grandaj, sed esence malnoblaj aŭ malsaĝaj — ja estas esceptoj aŭ esceptaj okazoj ke ili reviviĝas kiel noblaj aŭ saĝaj homoj.

Alia rakonto, "Stela Festo" ne estas fablo, sed rerakonto de legendo. Nu, en la nordhemisfera somera ĉielo, trans la Lakta Vojo bone videblas — tiel oni diras, sed mi aparte ne rimarkis — brilaj steloj Vego kaj Altairo. Sed ŝajne legendo pri ili cirkulas nur en orientaziaj landoj, kun festado. Kiel Sumii Sue mem skribis en sia eseo ĉi tie, titolita "Rememoro pri la Fabelo 'Stela Festo' ", tiunoma japana legendo (*tanabata*) emfazas, ke la du steloj estis geedzoj, sed ili estis permesitaj renkonti nur unu fojon en jaro, nome je la 7a tago de la 7a monato (julio). Sed laŭ ŝia fabelo, ne geedzoj, tamen gefratoj renkontiĝas unu fojon en jaro. La gefratoj estis reĝido kaj reĝidino, sed venkitaj en milito kaj poste pasigis mizeran vivon, ktp ktp. Laŭ la supre menciita eseo, la aŭtoro malkaŝas la fonton de la legendo, nome la legendon rakontis studentoj el Ĉinio, kiuj fuĝis de tiama ĉina reĝimo antaŭ duonjarcento, en 1920-aj jaroj. Al mi, tiu ĉi fabelo kaj la fona fakto estis la plej impresa en tiu ĉi libro.

ESEOJ

El inter la elektitaj eseoj, mi prenu "Rizo kaj Atomcentro", verkita de Sumii Sue post la 1986a atomcentra akcidento de Chernobyl en Sovetio (ja, hodiaŭ en Ukrainio). En la eseo, ŝi transdiris, kion tiutempa televida ĵurnalo ripetis: ke la japanaj atomcentroj estas elstare sendanĝeraj ktp. Tion perfidis la atomcentra akcidento en Fukuŝima en marto 2011. En la elekto de tiu ĉi eseo mi vidas, kion Huzimaki, la redaktanto kunsentis, mem tajpante la tradukaĵon en 2025, la eldonjaro.

Cetere, Sumii Sue loĝis en kamparo de Gubernio "Ibaraki", ne "Ibaragi" laŭ literumo.

Vojaĝo en Hachijōjima

SIBAYAMA Noriko

Mi kaj Zyun'iti (mia edzo) vojaĝis en Insulo Hachijōjima dum la unuaj tri tagoj de la novjaro. Nian grupon akompanis unu prizorganto el vojaĝagentejo kaj unu ĉiĉeronino, devenantino de la insulo. Laŭ ŝi Hachijōjima havas nur 9 tagojn kun tute serena vetero en unu jaro statistike. Tamen dum tri tagoj kiam ni restis en la insulo, vetero estis preskaŭ bela, kaj ŝi surpriziĝis.

En la dua tago ni vizitis paŝtejon nomatan “*Hureai Bokujō* (paŝtejo kun intertuŝiĝo)”. Mi antaŭĝojis interagi kun la bestoj sed ve, mi trovis ĉe la enirejo ŝildon montritan, “Ne tuŝu la bestojn”. Mi senluziĝis kaj en la koro klaĉante “Mensogulo!” paŝis la vojon inter la paŝtejo. Ni grupanoj en iom longa vico malrapide paŝis la vojon. Do, antaŭ mi iu maljuna virino falis surteren, kaj tuj ŝia edzo starigis ŝin, sed ŝi denove falis. Vidante tion la ĉiĉeronino murmuris, “Ĉu ŝi fartas bone?” Ni vidis ilin iom da tempo. Sed ŝi ne stariĝis. La edzo portis ŝin sur sia dorso. Tiam ŝi kriis pro doloro. Kelkaj grupanoj kolektiĝis ĉirkaŭ ili. Sekve du viroj provis teni ŝin de ambaŭflanke. Ŝi denove kriis. Finfine kvar personoj tenis ŝin kaj transportis al proksima ripozejo.

Intertempe grupanoj marŝantaj post ni alvenis kaj diris al la ĉiĉeronino, “Malantaŭ ni estas viro, kiu verŝas sangon ĉe la kapo. Nun prizorgas lin la akompananto.” Aŭdinte tion la ĉiĉeronino konsterniĝis kaj konfuziĝis.

Post iom da konsiliĝo de niaj du zorgantoj kaj tieuloj, ili venigis ambulancon. Ni, aliaj grupanoj atendis tie iom da tempo, kaj vidis alvenon de du ambulancoj.

La du vunditoj estis tuj portataj al hospitalo. La aliaj grupanoj daŭrigis vojaĝon laŭ la plano sen troa prokrasto.

En la buso ni eksciis, ke la virino enhospitaliĝis pro ostorompo. En la hotelo ni vidis la vunditan viron kun bandaĝo sur la kapo, interparolis kun vicadministrantino de la hotelo.

Mi kaj Zyun'iti ĉiam aĉetas asekuron kiam ni vojaĝas. Nun ni pli bone komprenis la gravecon de asekuro. La vojeto inter la paŝtejo aspektis tute ne danĝera. Tie eĉ du homoj vundiĝis. Al ni, maljunuloj, ĉio povas okazi.

En la lasta tago ni vizitis vendejon de popolartaĵoj *kihachijō* (黄八丈). Tie ĉiam malkavalira(?) Zyun'iti eligis nekredeblajn vortojn al mi. “Ĉu vi ion deziras el la artaĵoj? Ĉu mi donacos ion al vi?” Ĝustatempe mi rigardis unu okulvitran ujon el *kihachijō*. Do mi senproklaste respondis “Mi deziras tiun ĉi”. Ĝoje mi akiris la ujon.

Pro la efiko de tajfuno atakinta en oktobro 2025, nia vojaĝo estis iom reduktita. Laŭ la komenca plano, ni rondvojaĝos la insulon, sed fakte ni povis vojaĝi tri kvaronojn.



ni sur la modeloj de martestuda karapaco

sezonvorto marta

La unua bonito (hatsu-gatsuo) 初ガツオ

Okita Kazumi

Bonitoj estas marfiŝoj. “La unuaj bonitoj” estas tiuj bonitoj, kiuj de printempo ĝis frua somero migras norden al la Pacifika Oceano proksime de Japanio de sudaj maroj, laŭ la marfluo Kuroŝio. Ili estas karakterizataj de malpeza kaj delikata gusto, kaj nuntempe oni plej ofte manĝas ilin kiel “tataki”, nome: unue oni bakas la viandan parton de bonito forte sed nur surface, kaj due oni ĝin dispecigas, kaj gustigas ĝin i.a. per sojsaŭco kaj zingibro.

